

Sud-Rejna Kuriero

Januaro
2018

Komuna inform-bulteno de Esperanto-Societo Basel kaj Mulhouse-Esperanto

N°68

Espace 110
FR-68110 ILLZACH
CCP 19684 F Strasbourg
mulhouse.esperanto11@free.fr



Esperanto Societo Basel
Postfach 178
CH-4005 Basel
esperantobasel@gmx.ch

*Karaj membroj, karaj gesamideanoj,
karaj legantoj,*

*Jen la unua numero de la nova jaro 2018. Ni
esperu, ke ĉiuj el vi sukcesis agrable transiri al la
nova jaro. Nun ni deziras al vi:*

**Plej feliĉan novan jaron
2018 kaj sukcesojn en
viaj Esperanto-agadoj.**



*Vi trovos en ĉi-tiu numero raportojn pri pasin-
taj eventoj de oktobro ĝis decembro, interalie pri
la grava Zamenhof-festo en Bazelo.*

*Jarfine okazis diversaj Esperanto-semajnoj ĉefe
en Germanio. Jen raporto pri Luminesk.*

*Ankaŭ tute lokaj agadoj estas menciindaj. Niaj verdaj fadenoj kaj iniciato en
restoracio.*

*Krome nia grupo akceptis organizi la regionan printempa staĝon en Rimlis-
hof en Buhl apud Guebwiller. Jam informoj kaj aliĝilo por via baldaŭa aliĝo.*

Laste, Bernard refoje bonvenigas vin en la nova jaro per saĝaj pripensoj.

André Grossmann

| | | |
|--------|------------|-------------------------------------|
| Jaŭdo | 25.01.2018 | Ĝenerala Jarkunveno |
| Lundo | 26.02.2018 | Verda Fadeno 'Porte de France' |
| Jaŭdo | 22.03.2018 | Monata kunveno : Babilado |
| Lundo | 30.04.2018 | Verda Fadeno 'Porte de France' |
| Jaŭdo | 24.05.2018 | Monata kunveno/Grün '80/Rheinfelden |
| Lundo | 25.06.2018 | Verda Fadeno 'Porte de France' |
| | 07.2018 | Ferioj |
| | 08.2018 | |
| Jaŭdo | 27.09.2018 | Monata kunveno : Babilado |
| Lundo | 29.10.2018 | Verda Fadeno : 'Porte de France' |
| Jaŭdo | 22.11.2018 | Monata kunveno : Programo |
| Sabate | .12.2018 | Zamenhofa festo en Germanio |

Nicole Béroud

JARRAPORTO 2017

Kiel ĉiu jare, raporto estas la okazo trarigardi la aktivecojn de la jaro :

En januaro okazis nia Jarkunveno en Riehenring 131, kie estas vere ege agrable kunveni. Nun jam pripensis la programon de Zamenhofa festo, kiu devis okazi en decembro. Anna-Lise Nicolodi proponis viziti la “Gundeldingerfeld”, iama firmao Sulzer, kiu moviĝis al Winterthur. Tiel povis esti kreita alternativa kvartalo kun restoracioj, teatro, bierfarfejo, ktp...

Por manĝi Anna-Lise proponis la restoracion “Soup and Chill”, kie senhejmaj personoj povas vespere manĝi kaj kune sidi kaj babili. Per “gastigada servo” por grupoj ili prenas monon kaj povas pagi ilian projekton.

En februaro por la kunveno ni kunsidis en agrabla rondo denove

en Saint-Louis, ĉe la restoracio “Porte de France”, kie ni rajtas uzi la apartan salonon. Ni havis la viziton de Didi Weidmann, kiu parolis pri la ĵus eldonitaj du libroj “Heidi” de Johanna Spiry .

En marto ni babilis kviete dum la monata kunveno.

En aprilo “Verda fadeno” ni denove kunvenis en restoracio “Porte de France”, kie oni agrable povas kunveni.

En majo ni kunvenis jam pli frue kaj aŭtomobile veturis ĉe Patrick en Blauen, kie ni iomete promenadis ĉar pluvetis kaj poste ni gustumis bonegan de Patrick faritan pomkukon. Hans-Peter proponis prezenti kvartalon de Bazelo dum la Zamenhofa festo.

En junio, ni denove kunvenis en la restoracio “Porte de France” en Saint-Louis kaj babilis agrable kune.

Post la ferioj la temo de la septembra monata kunveno estis pri niaj someraj aktivaĵoj kaj precizigo de la programo de la Zamenhofa festo.

En oktobro ni trafis niajn samideanojn el Saint-Louis kaj ĉirkaŭaĵo en la restoracio “Porte de France” en Saint-Louis por agrabla babilado.

En novembro ni denove kunvenis por fari nian programon kaj fiksi la detalojn de la Zamenhofa festo, ĉar intertempe Svisa Esperanto-Koruso proponis veni al Bazelo por kanti.

Tiel en decembro por la Zamenhofa festo post kunveno en SBB-halo, ni promenadis al Gundeldingerfeld, kie en du grupoj ni vizitis la novan kvartalon detale. Vere interese. Post tio ni marŝis al la domo de “*Soup and Chill*”, kie ni vere bone manĝis pladon pretigitan de turka kuiristo kaj lia teamo.

Post la manĝo ni admiris la belegajn bildojn de Hans-Peter Senn, kiu prelegis pri Bazelo. Por konkludi, la koruso kantis por ni kaj kun ni diversajn kantojn. Ni vere povas danki, ke ili venis al ni de Flauil, Winterthur, Interlaken, Pully, Ĝenevo, Chaux-de-fonds, ktp...

Kelkaj partoprenantoj kaptis la okazon ankoraŭ viziti la belan krisnaskan bazaron kaj eĉ vidi la paradon de la krisnaskaj ŝoforoj de Harley Davidson.

Nicole Béroud

Esperanto – Societo Basel

Ĝenerala jarkunveno

Ni invitas vin por ĵaŭdo la 25.01.2018 al la Ĝenerala Jarkunveno, en nia kunvenloko en Riehenring 131

Komenco je la 17h

1. Bonvenigo
2. Elekto de la tagprezidanto
3. Protokolo de la Ĝenerala Jarkunveno 2016
4. Aliĝoj kaj ekziĝoj
5. Raportoj a) de la prezidanto
 b) de la kasisto kaj kaskontrolantoj
6. Senŝarĝigo de la estraro
7. Elektoj a) de la prezidanto
 b) de la vicprezidanto
 c) de la kasisto kaj kaskontrolantoj
 ĉ) de la sekretario
8. Kontribuoj a) al CDELI
 b) al pacmovado
9. Proponoj
 Tiujn bonvolu skribe prezenti ĝis la 15-a de
 januaro 2018 al Esperanto Societo Basel.

Esperante, ke vi multnombre partoprenos, ni salutas vin samideane.

La estraro

La personoj, kiuj ne aktive partoprenas en nia rondo, bonvolu pagi la jaran kotizon per aparta enpagilo, la aliaj bonvolu pagi rekte al la kasisto.
Anticipan dankon.

Membro unuopa CHF 25.-

There is hope = Esperanto

Die Idee von Zamenhof nationale Abschottung durch eine Weltsprache zu überwinden ist über 100 Jahre alt, aber in der heutigen Zeit aktueller denn je. Die Perestrojka und der Mauerfall im Jahr 1989 ließen die Hoffnung aufkeimen, dass die Welt zusammenwächst.

Es erwies sich wie wir heute fast täglich erleben als beklagenswerter Irrtum. Die Weltsprache Englisch führte nicht dazu, dass wir heute in einer friedlicheren Welt leben, in der Menschenrechte für alle gelten. Die neoliberalen Konzepte haben die Herrschaft erlangt. Englisch als globale Sprache des Internets hat sich in Tweets, Werbespots, fake news und Hassmails als Sprache einer Weltkultur mehr oder weniger diskreditiert. Während Großkonzerne die Globalisierung gnadenlos ausnutzen, um ihre Profite zu maximieren fallen die Menschen aus der Globalisierung wieder in nationale Interessenvertretungen zurück. Manche erkennen auch hier in Europa bereits Anzeichen eines Bürgerkriegs – das Haßpotential in Internetforen, die Hilfslosigkeit der Politiker weist Ähnlichkeiten mit der Zeit vor den beiden Weltkriegen im letzten Jahrhundert auf.

Die Jugend steht in einem gnadenlosen Ausbidungswettbewerb wie auch die Städte in einem gnadenlosen Wettbewerb getrieben werden. Über allem schwebt das Damoklesschwert der Roboterisierung, Verdrohnung und Digitalisierung, das mit einem Wegfall von Millionen von Jobs droht. Wo ist noch Hoffnung?

Das Wort Hoffnung gab der Weltsprachen Esperanto ihren Namen. Ihre Ziele waren nie die Vorherrschaft und Dominanz wie es das Bramlish (Britisch + Amerikanisch Englisch) heute erlebt. Esperanto hatte und hat wirklich den Weltfrieden als Ziel, da es als gemeinsame Sprache nicht mit nationaler Überlegenheit einhergeht und territoriale Ansprüche hegt.

Die vorurteilsfreie und wertschätzende Kommunikation in einer Sprache, die allen gehört wäre ein Ansatz für Lösungen unserer globalen Probleme 23 Sprachen in Europa zu überwinden ohne auf BrAmlish zurückgreifen zu müssen, wäre ein Akt der kulturellen Befreiung neoliberaler Leitkultur hin zu einer völkerverbindenden Gegenbewegung, die unsere Welt heute dringender braucht als je zuvor.

Peter Focke

Agad-raporto de Mulhouse-Esperanto pri la jaro 2017 fare de la sekretario.

Kursoj por lernantoj okazis ĉiu-semajne marde en Espace 110. La nombro de la gelernantoj estis 3 ĝis 5

La kunvenoj “verda fadeno” regule okazis alterne en Mulhouse kaj St Louis la lastan lundon de ĉiu monato. Nun estas **15** personoj enskribitaj en la dissendo-listo verda-babilejo kaj 30 en Mulhouse-Esperanto

En la 10a de januaro okazis la tri-reĝa festo. Ĉiuj povis gustumi la tortojn kaj la vinon!

La Ĝenerala Membro Kunveno okazis la 10an de februaro en Espace 110.

Ni partoprenis la Libro-Bazon en Saint-Louis la 13an kaj 14an de majo. Nia temo estis: "Le livre en espéranto".

La 69a Internacia Fervojista Esperanto-Kongreso okazis en Colmar de la 16a ĝis 24a de majo.

En la sama evento okazis la 81a reĝiona staĝo de Mulhouse-Esperanto kaj de **Esperanto France-Est** la 19/20/21ajn de majo.

10 membroj partoprenis al la tradicia komuna manĝo de la fino de la lernojaro en la restoracio “Des Lys d'Alsace” en Saint-Louis-Neŭeg la 22an de junio.

La tradicia “Amika Tago” okazis la 25an de junio organizita de Ginette en la Vogezoj en Dommartin-les-Remiremont.

La asocio ĉeestis la transliman manifestacion de la “solidaraj najbaroj” la 23 kaj 24an de septembro.

La 18an kaj la 19an de novembro ni partoprenis en Ungersheim la foiron pri ekologio kaj justa komercado.

La Zamhofa festo okazis en la **Bazelo la 9an** de decembro.

SRK aperis 3 foje.

Nia retejo <http://mulhouse.esperanto.free.fr>

Niaj dissendo-listoj por facile komuniki:

- mulhouse-esperanto@googlegroups.com
- verda-babilejo@googlegroups.com

Ivo Stutz

Nia venonta Ĝenerala Membro-Kunveno okazos la 9an de februaro 2018, tial jam nun nia sekretario Ivo pretigis por vi la agado-raporton.

Lasta Verda fadeno en Rixheim



Fine de novembro okazis nia lasta verda fadeno de 2017 en la jam kutima restoracio "La Pataterie" en Rixheim. Iom interkonsente kun la Bazela grupo ni okazigas niajn verdajn fadenojn alterne en Rixheim kaj en Saint-Louis. Tial nia unua verda fadeno en januaro 2018 okazos en Rixheim. (okazis ŝanĝo)

Bonvolu konatiĝi kun la novaj datoj de la venontaj rendezuoj.

Krome ni jam ricevis la kalendaron de Bavelo-eventoj.

Jen la kalendaro de venonta verdaj fadenoj.

- ◆ 29an de januaro 2018 en Rixheim La Pataterie, rue de l'Aérodrome Rond-point de La Piscine - A35.
- ◆ 26an de februaro 2018 en la restoracio "Hotel-Restaurant Porte de France", 94 avenue de Bâle, Saint-Louis.
- ◆ 26an de marto 2018 en Rixheim La Pataterie, rue de l'Aérodrome Rond-point de La Piscine - A35.
- ◆ 30an de aprilo 2018 en la restoracio "Hotel-Restaurant Porte de France", 94 avenue de Bâle, Saint-Louis.

- ◆ 20.-22.04.2018 (BAVELO) Esperanto-staĝo apud Colmar, Francio
- ◆ 18.-21.05.2018 Germana Esperanto-Kongreso en Zweibrücken, Germanio
- ◆ 09.06.2018 (BAVELO) Esperanto-Tago en Heilbronn, Germanio
- ◆ 07.07.2018 (BAVELO) Migrado en la Danubo-valo
- ◆ 12.-14.10.2018 (BAVELO) Bavelo-Seminario en Heidelberg, Germanio
- ◆ 22.09.2018 (BAVELO) Migrado en la Nigra Arbaro
- ◆ 10.11.2018 Zamenhof-festo en Villingen
- ◆ 09.12.2018 Zamenhoffesto en Stuttgart
- ◆ 15.12.2018 Zamenhoffesto de Triangulujo en Freiburg

Zamenhof-festo en Bazelo 9a de decembro 2017



Esperanto-grupo de Bazelo organizis en decembro 2017 la lastan Zamenhof-feston en Bazelo mem. Nia rendezuo okazis en la stacidomo de Bazelo ĉirkaŭ la 10a matene. Venis samideanoj el Svislando kaj Francio, tiuj el Germanio venis iom pli malfruaj.

De tie ni promenis piede al la kvartalo Gundeldingerfeld. Tie iam troviĝis vasta fabriko de Sulzer. Tamen anstataŭ ol ĝin detruj, kaj eventuale tie konstrui novajn loĝdomojn, estis decidite konservi la diversajn halojn kaj ilin adapti al aliaj celoj. Restoracio, bier-fabrikejo kaj bier-trinkejo, infan-lernejo, vasta grimpejo, spektaklejo por kulturaj aranĝoj, junulargas-tejo, ktp.



Pli ol 70 diversaj grupoj, organizaĵoj, aktivas tie. Krome oni volonte lasis malnovajn instalaĵojn por atesti pri historiaj elementoj de la pasinteco de tiu loko. La celo ne estis ĉion purigi sed ankaŭ konservi.

Tiel ankaŭ kreiĝis tute loka biero, kiu nomiĝas "Unser Bier" "Nia Biero" konkurence al grandfirmaoj. "Biero de ĉi-tie anstataŭ biero de fore".

Tamen ŝajne estis malfacile forigi la industriaran odoron de lignaj kaŝeloj de la planko de iu laborejo.

Post tiu interesa vizito, la tuta grupo piede promenis al la restoracio kun la stranga angla nomo "soup and chill", ĉar ĝi ankaŭ proponas supon al iuj senhejmuloj.

Tamen jam antaŭ la manĝo la svisa koruso montris sian talenton per kantado.



Bongusta manĝo estis servita, por iu ĝi estis vegetara.

Sur apudaj tabloj estis metitaj Kelkaj libroj de la svisa librejo kaj de Mulhouse-Espéranto.



Refoje la svisa koruso kantis diversajn melodiojn por la plezuro de la ĉeestantoj.



Inter la gekantistoj ankaŭ troviĝis artistino, nome Anjo Amika el Hungario.



La estrino de la restoracio ankaŭ alparolis la gastojn. Ŝi estras ege efike kaj bonkore por akcepti ankaŭ senhejmuloj. Ŝi legis belan tekston pri tio.

Poste okazis la prelego de Hanspeter SENN pri malnovaj kvartaloj de Bazelo. Li montris tre belajn fotojn de tipaj kvartaloj.

luĝ el la fotoj estis facile rekoneblaj, ĉefe ĉirkaŭ la Rejno. Tamen pri nomoj de lokaj famuloj estis malfacile memori.

Li ricevis varman aplaŭdon.



La promenado finiĝis per vagado tra la urbo. Abundis la homoj ĉefe ĉirkaŭ la Krisnasko-bazaroj.

Fakte iom post iom nia grupeto malgrandiĝis. Laste eblis ankoraŭ vidi parodon de Avofrostoj sur motor-cikloj.

**Fotoj kaj raporto de
Andreo**

Zamenhofa festo 2017 12 9 Kolektiĝis je la 10.a15 en ĉefa halo de stacidomo Bazelo, ĉirkaŭ 40 s-anoj el tri landoj: Francio, Germanio, kaj Svislando.

Organizis la eventon la E-klubo de Bazelo sub gvido de S-ino Nicole Bérout.

Kune ni promenadis al la iama uzino de Sulzer en kvartalo de Gundelfingen-Bazelo. En la fabrikaj haloj nun troviĝas restoracio, junulara gastejo, artistoj kun atelieroj, kinejo, teatro, alta muro por trejni mont-grimpadon.

Krome trovis lokon plej diversaj grupoj, organizaĵoj, kaj firmaoj. La konstruaĵaro estas sub protekto de svisa leĝo, oni ne rajtas malkonstrui ĝin.

En unu granda salono estas vere aparta restoracio: En ĝi komplete mankas lumo. Servistoj estas blinduloj, kiuj alportas la menuojn al vidantoj, kiuj subite ne plu vidas (ĉar la roloj inversiĝas) la handikapitoj kapablas gvidi la ne plu vidantojn. Tamen ni antaŭ-mendis la tagmanĝon en restoracio por vidantoj, sed ankaŭ ĝi estas aparta. En ĝi



kunvenas marĝenuroj, personoj en malfacilaj socialaj situacioj. La kuiristoj kaj kelneroj estas azil-petantoj el aliaj kontinentoj, kun tre malsamaj lingvoj. Antaŭ la unua plado, la svisa koruso enkondukis la frandan manĝon per plurvoĉa konvena melodio.

“la himno al vino”. La kantistoj estis: Verena, Dorotee, Jun, Anjo, Nancy, Ruth, Gabriel kaj Dieter.

Anjo Amika distribuis la “Heroldon” el KCE = kultura centro esperantista kaj valoran revuon LF = literatura foiro. Didi (Vajdman) Weidman el Svislando prezentis la nove tradukitan bildlibron: Sonorilurĉjo, Manfred Vestermajer (Westermeier) el Germanio petis monon por subteni Esperanto-projekton en Afriko. Andreo Grossmann el Francio ofertis kelkajn librojn, unu temis pri Esperantisto el Bazelo, Karlo Nikolodi (Nicolodi).

Posttagmeze ni aŭskultis erudician lumbild-prelegon pri la historiaj kvartaloj de Bazelo. Multaj domoj preskaŭ ne ŝanĝiĝis dum paso de kelk-jarcentoj. Post la kafopaŭzo la svisa koruso elpaŝis per la kanto de Mozart: “Al la fratoj, estu pac` kun ni, juniĝu ni per nia kant` kaj konkludiĝis per ĝisa kanto: “ bonan nokton “.

Ĝoje kaj bonhumore ni disiĝis por fari aĉetojn en la kristnaska bazo, ĝis revido venonta jaro en Berno.



Fotoj kaj raporto de Dieter Rooke

LUMINESK'

27.12.2017 - 03.01.2018

La silvestra renkontiĝo de Germana Esperanto-Asocio

Ĉirkaŭ 50 s-anoj el Germanio, Francio, Belgio, Nederlando, Rusio, Svislando, kaj elmigrintoj el Ĉinio kaj Japanio alveturis al la urbeto en Rur-regiono proksime al Monastero (Münster).

La ĉefa organizanto, Andreas Diemel sukcese engaĝigis kompetentan teamon por prezenti tuttagan alloge buntan programon. Abundis video-filmoj kaj fotoĵoj el la vasta mondo el Ĉinio ĝis Argentino.



Eks-diplomato Ulrich Brandenburg prelegis pri la kriza politiko de Eŭropa unio, ĝia historio kaj estonto. Prezidanto de TEĴA (jurnalista asocio) S-ro Alfred Schubert, kontribuis per bildprelego de kongreso en Varsovio, ĝi omaĝis la 100-jaran datrevenon de la morto de LLZ. Poste li rakontis pri la 35 mil Rotari kluboj en la mondo, du el ili uzas nian lingvon. S-ino Liu Jun gaje parolis pri sia vivo kun Esperanto-gusto, montris filmon kiel kuiri svisan fonduon, kaj multajn fotoĵojn el Esperanto-renkontiĝoj. Ŝia edzo, Dieter Rooke scivoleme vizitis Nordan Koreion helpe de Esperantistoj el Pekino kaj lima urbo Dandong kaj informis pri la konferenco de unuiĝo de norda kaj suda Koreioj, okazinta dum la UK en Seulo. S-ino Tatjana Loskutova vojaĝadis tra Nepalo kun akompano de tieaj esperantistoj.



Ankoraŭ videblis spuroj de la granda tertremo. Ŝi ofertos post UK en Finnlando denove karavanon per trans-siberia trajno.

La antaŭnokto mezana programeron kun nomo "gufujo" preparis Dieter Kleemann kun edzino.



S-ro André Grossmann el Francio elŝprucis konstante novajn ŝercojn: Parizano ege miris pro la bovin-mama horloĝo. Ĝin nur scias legi kamparano.

La silvestra vespero estis surpriza: S-ino Barbara Brandenburg organizis kuiristan konkurson.

La titolon. "majstra kuiristo" gajnis S-ino Liu Jun, preparinte salaton el fruktoj kaj diversaj ingrediencoj. Dum vespero antaŭ la balo ni ĉiuj entuziasme kantadis la refrenon: Vivu, vivu la verda stel'.

Senĉesaj bondeziroj kaj interkizado portis nin al nova prospera jaro 2018.

Ĝis revido dum la venonta Luminesk`ie en Germanio

**Raportis Dieter
Rooke DM de UEA**




83a Regiona Staĝo de Esperanto

organizita
de

MULHOUSE  ESPERANTO

Por

En amikaj rilatoj kun
BAVELO



20 / 21 / 22-ajn de aprilo 2018

En la Feriejo RIMLISHOF 3, rue de Rimlishof
68530 BUHL apud Guebwiller

Nia distra vespero

Anjo AMIKA

Ne plu ofte eblas aŭdi en Esperantio profesiajn artistojn, kiajn ni ĝuis antaŭ la falo de la Fera Kurteno, kiam la okcidenteŭropaj ŝtatoj subvenciis



Esperanton. Escepto resta Anna Bartek – artista nomo Anjo AMIKA – profesia kantistino el Hungario. Ŝia repertuaro ampleksas modernajn, klasikajn kaj ekleziajn kantojn. Ŝiaj diskoj estas eldonitaj de Kooperativo de Literatura Foiro, en Svislando.

Ni scias, ke ŝi havas admirantojn en nia regiono, kie ŝi jam kantis (printempa staĝo en Landersen – Valo de Munster, en marto 2009). Cetere: ŝi bone memoras tiun ĉi kantvesperon! Ŝi ankaŭ promesis kantigi la staĝanojn jam

Spomenka Ŝtimec

Spomenka Ŝtimec, esperantlingva kroata verkistino, nun famas en la t u t m o n d a Esperantio. Kiel juna aŭtorino ŝi prelegis en



Mulhouse dum nia 31-a federacia staĝo en 1991. Nun, post 26 jaroj ŝi revenos kaj prezentos la kroatan movadon, nian samlandanon Roger Imbert, kiu estis eminenta aktivulo en la zagreba movado. Ŝi kompreneble ankaŭ parolos pri sia verkaro! Ne maltrafu tiun ĉi rendevuon kun eminenta esperantistino.

La libroservo proponos siajn 700 titolojn dum la tuta staĝo



Ĉi-tiu ferio-komplekso situas ĉe monto-flanko en Buhl apud Guebwiller en mirinda parko. Ĝi troviĝas survoje inter Guebwiller kaj Markstein.

Proksimaj stacidomoj:
Colmar, Mulhouse, Bollwiller

En tiu ferio-centro ni loĝos en du domoj

En la domo: **Arche** troviĝas ĉambroj kun necesejo kaj duŝejo kaj la restoracio.

En la domo **Colombe** troviĝas ĉambroj kun necesejo kaj duŝejo sam-etaĝe kaj ankaŭ la salonoj por prelegoj kaj kursoj.

ALIĜOJ kaj Restado-kostoj

| | |
|---|------|
| Ĉef-aliĝanto abonanta "La Informilo"n aŭ loĝanta ekster Francio | 30 € |
| Ĉef-aliĝanto ne abonanta "La Informilo"n kaj loĝanta en Francio | 47 € |
| Kun-aliĝanto (sama adreso kiel ĉef-aliĝanto) | 18 € |
| Junulo inter 10 kaj 25 jaroj | 12 € |
| Infanoj malpli ol 10 jaroj | 3 € |

Ĉambro kun 2 ĝis 5 litoj kun necesejo kaj duŝejo

| | |
|--|------|
| Kompleta pensio (1 tranokto + 1 matenmanĝo + 2 manĝoj) | 61 € |
| Duon-pensio: (1 tranokto + 1 matenmanĝo + 1 manĝo) | 53 € |
| Suplemento por individua ĉambro | 12 € |

Ĉambro kun 2 ĝis 8 litoj necesejo kaj duŝejo sur sama etaĝo

| | |
|--|------|
| Kompleta pensio (1 tranokto + 1 matenmanĝo + 2 manĝoj) | 51 € |
| Duon-pensio: (1 tranokto + 1 matenmanĝo + 1 manĝo) | 43 € |
| Suplemento por individua ĉambro | 10 € |

Pruntericevo de supra lito-tuko kaj tualetoj tukoj

7 €

Apartaj manĝoj

15,30 €

Aliĝilo por la 83a Regiona Staĝo de Esperanto en Rimlifthof la 20/21/22ajn de aprilo 2018

| S-ro S-ino | Familia nomo | Persona nomo | Aĝo, malpli ol 18 aŭ studento | Aliĝ-kotizo | Elektita kurso |
|---------------|---------------|--------------|-------------------------------|-------------|----------------|
| 1 | ĉef-aliĝanto | | | | |
| 2 | kun-aliĝantoj | | | | |
| 3 | | | | | |
| 4 | | | | | |
| Adreso | | | | | |
| | | | | | |
| | | | | | |

La aliĝ-kotizo entenas la partoprenon al kurso, prelego kaj distra vespero.

Mi preferas manĝi vegetare

Telefono:

Ret-adreso:

Mi pagas la tutan restadon aŭ minimume la aliĝkotizon:
per ĉeko per ĝiro per internacia ĝiro al André Grossmann
Krom grava evento, la aliĝkotizo ne estas repagebla.

Mi deziras ricevi mapeton por helpi la alvenon al la staĝo (signu)

- Mi elektas ĉambron kun necesejo kaj duŝejo
- 1-litan ĉambron 2-litan ĉambron plurlitan ĉambron
- Mi elektas ĉambron sen necesejo kaj duŝejo, ili estas sametaĝe
- 1-litan ĉambron 2-litan ĉambron plurlitan ĉambron
- Mi deziras prunte-ricevi lito-tukon kaj tualet-tukojn (7 eŭroj)

Kiam kaj kiom de manĝoj kaj tranoktoj, bonvolu kompletigi

Vendrede

Sabate

Dimanĉe

Tagmanĝo:

Vespermanĝo:

Tranoktado:

Provizora Programo:

Vendrede 20-an de aprilo 2018

- 17a Akcepto de la unuaj alvenantoj
- 17a30 eblas libere viziti
- 19a Vespermanĝo
- 20a30 Prezento de diapozitivaj
- 21a45 Malfermo de la knajpo.

Sabate 21-an de aprilo 2018

- 8a30 ĝis 9a30 Matenmanĝo
- 9a30 Turismado vizito al Murbach
- 12a Reveno al la staĝejo
- 12a30 Tagmanĝo
- 13a30/14a30 Akcepto de alvenantoj
- 14a/14a30 Prezento de la novaj libroj de la libroservo
- 14a30/18a Kursoj C kaj D.
- 19a Vespermanĝo
- 20a30 Distra vespero kun Anjo Amika
- Poste Knajpo malfermita

Dimanĉe 22-an de aprilo 2018

- 8a30 ĝis 9a30 Matenmanĝo
- 9a30/12a Kursoj C kaj D
- 12a30 Tagmanĝo
- 13a30 Komitat-kunsideto
- 14a Turismado
- Poste: disiĝo

Eksterlandaj partoprenantoj ricevos senpage nian bultenon **La Informilo** dum unu jaro.

La programo de ĉi-tiu staĝo estas ankoraŭ tute provizora.

Ni klopodos ĝin aktualigi kaj disponigi al vi elŝuteblajn programon kaj aliĝilon, ĉe nia retejo:

<http://esperanto.france.est.free.fr>

Bonvolu sendi la aliĝilon kaj vian antaŭpagon al :

André Grossmann
5, rue des Pyrénées
68390 BALDERSHEIM

Ĉekoj nome de: André Grossmann
CCP 819 34 U Strasbourg

Internaciaj ĝiroj al: IBAN:

André Grossmann
FR6920041010150081934U03669

BIC: PSSTFRPPSTR

Pliaj informoj ĉe

André Grossmann:

andreo.ag16@free.fr

Tel. 03.69.54.46.93

poŝtel. 07.82.21.97.34

kaj Edmond Ludwig

esperanto.eludwig@orange.fr

Tel.:03.89.77.52.56

KURSOJ

C: Paroliga kurso:

Tute en Esperanto.

Gvidas Edmond Ludwig


D: Seminario:

Prelegas Spomenka Štimec



Esperanto-menuo en restoracio en Mulhouse

Jen interesa iniciato de Jacques kaj Bertrand. Fine de novembro ni estis invititaj manĝi en tiu solidara restoracio. La menuoj estis tradukitaj al Esperanto, krome troviĝis tie pluraj paneloj por informi pri la lingvo.



Ĉu Vakera filmo en Muhlbach ĉe Munster?

Printempa diversaĵo en la valo de nia prezidanto. Vakerfilma sceno en Muhlbach ĉe Munster: la trajno fajfis trifoje kaj la brutaro sturmis. Ĉi jare kun mia edzino ni iris al Muhlbach, kie loĝas nia filino, por prizorgi niajn genepojn dum iliaj gepatroj partoprenis la montaran brutaro-migradon. Tiu tradicia evento estas tre bela spektaklo fame konata en la regiono, sed la bovinojn, dank'al kiuj ni trinkas lakton kaj manĝas fromaĝon, oni ne direktas same kiel aŭton kaj kelkafoje, kiam ne respondeca homa kondukto incitas ilin, tiam tiuj ĉi povas iĝi danĝeraj.

La festo glate kaj plene disvolviĝis: la multnombraj homoj ĝuante malfruan someran tagon, promenis aŭ altabliĝis por refreŝiĝi aŭ aŭskultis folklorajn muzikajn grupojn, kaj ĉiuj entuziasme aplaudis kiam pasis antaŭ ili la brutaroj. Tradicie vestitaj homoj akompanis ilin, floroj ornamis la kornojn de la unuaj bovinoj, kaj unuavice ĉarmaj ambasadorinoj fiere portis panelon, sur kiu oni povis legi la nomon de la farmogastejo. Tamen jam mi rimarkis, ke kiel

en la biciklaj konkursoj, la ne ĉiam konsciaj spektantoj formis tro striktan spaliron al la tagaj stelulinoj.

Unu brutaro majstre gvidata, trankvile atendis, ke la barilo de la vilaĝa fervoja trapasejo leviĝu, kiam abrupte alproksimiĝanta vagonaro ekfajfis plurfoje kaj senutile.

Frenezigitaj, la bovinoj kiuj kutime rigardas pace la pasantajn trajnojn, ektorniĝis kaj furioze ekgalopis. Mi lasas vin imagi la panikon inter la spektantoj. Nur la flegmo kaj lerteco de la senĉevalaj vakeroj evitigis katastrofon, kiu fine tradukiĝis je kelkaj ne gravaj puŝpeladoj, unu homo renversigita kaj multe da timo.

Plendo estis deponita, ĉe la fervoja entrepreno (SNCF) laŭleĝe antaŭinformita pri tiu evento. Sed ĉu la vagonara ŝoforo ne sciis la reagon de bestoj, kiel bovinoj je bruska akra-sona bruo, tiam li prefere konduku urbajn tramojn, ĉu li ignoris tion aŭ simple li deziris amuziĝi per spektaklo de panigita hom-amaso, tiam oni enfermu lin.

Nia Kalendaro 2018

| | | |
|------------------------------------|---|---|
| Januaro 2018 | 9 - 16 - 23 - 30 12 29 | Kursoj por komencantoj kaj progresantoj en Espace 110 de la 18a ĝis la 19a30. Ni kune festos la 3-reĝojn en Espace 110 de la 18a ĝis la 19a30. Verda fadeno laŭ propono de Jacques, de la 19a ĝis la 20a30 en la restoracio La Pataterie rue de l'Aérodrome, 68170 |
| Februaro 2018 | 6 - 13 - 20 9 26 | Kursoj por komencantoj kaj progresantoj en Espace 110 de la 18a ĝis la 19a30. Nia Ĝenerala Membro-Kunveno en Espace 110 de la 18a ĝis la 19a30. Verda fadeno laŭ propono de Bertrand de la 19a ĝis la 21a en "Hotel-Restaurant Porte de France", 94 avenue de Bâle, Saint-Louis |
| Marto 2018 | 6 - 13 - 20 26 | Kursoj por komencantoj kaj progresantoj en Espace 110 de la 18a ĝis la 19a30. Verda fadeno laŭ propono de Jacques de la 19a ĝis la 20a30 en la restoracio La Pataterie rue de l'Aérodrome, 68170 |

KOTIZOJ KAJ ABONOJ POR 2018-2020

La kotizo al Mulhouse-Esperanto inkluzivas sendon de nia loka bulteno Sud-Rejna Kuriero. La membreco estas rezervitaj al la departemento 68 kaj donas la rajton voĉdoni okaze de Membro-kunveno.

Ekster la departemento ankaŭ eblas aboni nian bultenon SRK sen membriĝo al nia asocio.

Jen ĉi-sube la kotizoj kaj la abonoj por la 3 venontaj jaroj.

| Jaro | Reta versio (pdf) | Papera versio | Kolora ekzemplero |
|------|-------------------|---------------|-------------------|
| 2018 | 5 eŭroj | 8 eŭroj | 15 eŭroj |
| 2019 | 5 eŭroj | 8 eŭroj | 15 eŭroj |
| 2020 | 5 eŭroj | 8 eŭroj | 15 eŭroj |

Eblas pagi per ĝiro al Mulhouse-Esperanto CCP 19684 F Strasbourg aŭ par ĉeko al André GROSSMANN, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM

Membroj de Esperanto-Societo Basel ne estas koncernataj per tiuj tarifoj.

Sud-Rejna Kuriero aperas kvaronjare. Ĝin redaktas por Esperanto-Societo Basel: Hanspeter SENN, Paradieshofstr. 164, CH-4054 Basel kaj por Mulhouse-Esperanto: André Grossmann, 5, rue des Pyrénées, FR-68390 Baldersheim. Ĝin eldonas Mulhouse-Esperanto.



Tro ofte la moralo de la kredo kaj konvinkoj minacas, suferigas, malfeliĝigas kaj sklavigas.

Serĉi kun miro, respekto kaj pacienco
koni la mondon, la homojn kaj sin mem
ebligas kompreni,
ke la virto, la sindonemo kaj la bonkoreco
fortigas, liberigas kaj feliĝigas.

Ke 2018 helpu ĉiun
pli bone kompreni kaj konsideri la ekzistadon
por bone kune vivi en ĝojo kaj paco.

Bernard kaj Odette Behra